



# Ridu por via sano

Kay & Klaus Frieese

# **Ridu por via sano**

Kay & Klaus Friese

Hamburg

2023

# Enhavo

Antaŭparolo.....	4
Flugantaj fiŝoj.....	5
Blinda rendevuo.....	8
Observanto.....	10
Norda starado.....	12
Ŝnursaltado.....	15
Aviadila kraŝo.....	17
Tatuoj.....	19
Motorciklado.....	22
En la zoo.....	25
Telefonado.....	27
Ĉe la dentisto.....	30
Malica ĝojo.....	32
Akvario.....	34
Notoj de la desegnisto.....	36
Postparolo.....	40
Kolofono.....	41

## Antaŭparolo

Bonvenon ĉe la kartunoj [\*] de KAYSN! Tio estas la pseŭdonimo de Kay Friese, kiu jam en sia lerneja tempo komencis, fabriki strangajn pentraĵojn sub la tablo. Intertempe multaj novaj bildoj estis kreitaj. Vi povas rigardi ilin ekzemple ĉe:

<http://voll-im-eimer.blogspot.com>.

Ĉi tiu libro prezentas nur kelkajn elektitajn ekzemplerojn de la kartunoj de KAYSN.

Troviĝas ankaŭ du kontribuoj de la artefarita intelekto ChatGPT en la teksto. Sed ĉu vere estas produktoj de iu intelekto, vi devas mem decidi.

---

[\*] *Laŭ Vikipedio: kartuno estas formo de du-dimensia ilustraciita vida artaĵo.*

## Flugantaj fiŝoj

En la germana ekzistas tiu bone konata langorompilo:

Fischers Fritz fischt frische Fische.  
Frische Fische fischt Fischers Fritz.

La Esperanta versio sonas simile:

Fiŝisto Fritz fiŝas freŝajn fiŝojn.  
Freŝajn fiŝojn fiŝas fiŝisto Fritz.

Kiom ofte ni, kiel infanoj, provis reciti tion frazon sen eraro. Kaj poste denove per pli granda rapideco. Ĉiam, kiam ni stumblis, la aŭskultantoj trovis kaŭzon por laŭta rido. Do, langorompilo povas prosperigi la bonan humoron. Kaj bona humoro kaj ridado estas tiel sanigaj! Tial ekzistas ankaŭ la tiunomata rid-jogo dum tio oni ja ekzercas ridon sen kaŭzo.

Ŝajne estas tre stulte renkontiĝi por tiam ekridi sen kialo. Sed tio ja estas bona por la sano kaj tial ne povas esti danĝera. Nur evitu tiajn ekzercojn, se vi havas iujn antaŭekzistajn malsanojn, ĉar dum ridado okazas ŝancelaj movoj de la diafragmo. Alikaze nur estas bonaj efikoj: Streshormonoj estas reduktitaj, la imuna sistemo plifortiĝas kaj nia kardiovaskula sistemo estas forte stimulata.

Dum ĉiutaga vivo ne estas tro ofte kaŭzoj por ridi. Tamen vi povas ŝanĝi tion. Kion vi pensas pri ĉi tiu propono?

Vi estas ekzemple en familia kunveno. Ĉiu enuige rigardas la telerojn kun pecoj da kuko. Kaj vi subite eltiras etan slipon el via poŝo. Sur tiu estas skribitaj kelkaj langorompiloj. Kaj vi nun tre malrapide voĉlegas ilin. Poste vi postulas ke iu de la ĉeestantoj ripetu minimume unu gajan frazon, sen fari eraron. Rezulte la etoso de la kunveno certe pliboniĝus.

Jen kvar ekzemploj faritaj de ChatGPT. Nur kelkaj etaj korektoj estis necesaj.

Bela birdo batis bruegan bubon.  
Bubon bruegan batis bela birdo.

Amikoj aĉetis altvalorajn ananasojn.  
Ananasojn altvalorajn aĉetis amikoj.

Koloraj katoj kuras kune.  
Kune kuras koloraj katoj.

Stranga stelo staras sur ŝtelita ŝipo.  
Sur ŝtelita ŝipo staras stranga stelo.



„Ni estas fiŝantaj muŝoj - kaj fiŝas flugantajn fiŝojn.“

Ĉu la fiŝantaj muŝoj havas sukceson? Mi pensas, ke jes. Ĉar la karikaturisto bone ilustras la grandan streĉiĝon de la fiŝistoj kaj kiel timigitaj la fiŝoj estas en iliaj okuloj.

## Blinda rendezuo

Laŭ Vikipedio ‚blinda rendezuo‘ estas rendezuo inter homoj, kiuj ankoraŭ ne persone renkontiĝis. Ili scias nenion aŭ nur malmulton pri la alia.

Ĉar ili ambaŭ ne vidis la alian, minimume unu de ili devas kunporti markon por rekoni la alian. Tio povas esti floro en butontruo aŭ speciale okulfrapa ĉapo.


En 1987 prezentiĝis la usona filmkomedio 'Blind Date – Rendezuo kun nekonata virino'. La ĉefajn rolojn ludis Bruce Willis kaj Kim Basinger. Laŭdire la filmo havis feliĉan finon.

Blindaj rendezuoj ofte aperas en koreaj dramoj. Tie ekzemple ambicia patrino provas trovi filinon el riĉa familio por sia filo, kiu ĉiam ankoraŭ estas fraŭlo. Kompreneble la filo sentas sin ĝenita pro la senfinaj klopodoj de sia patrino. Sed ankaŭ lia patro ĉikanas lin, ĉar li nepre deziras baldaŭan nepon.

Finfine la blinda rendezuo okazis, sed la sekreta amikino jam aŭdis pri tiuj planoj kaj nun provis interrompi la rendezuon kun ĉiuj eblaj rimedoj.



La sekvanta bildo montras tute alian situacion:



„Malbenitaj blindaj grupo-rendevuoj! 90- 60- 90 **ne** estis la korpaj mezuroj.“ - „Andreas el Lübeck?!?“

## Observanto

Kaj kial vi rigardas la lignereton en la okulo de via frato, kaj ne pripensas la trabon en via okulo?

*[Mateo 7: 3, Sankta Biblio]*

Tiu, kiu loĝas en vitra domo ne ĵetu ŝtonojn.

Rigardu vin mem!

Ĉiu balau antaŭ sia propra pordo!

Jes, ekzakte pri tio temas en ĉi tiu bildo. Sed kial ni trovas tion tiel amuza?

Ĉi tie staras geedza paro ĉe la fenestro. La viro direktas sian binoklon al la fenestro de la aliflanka domo. Tie montriĝas iu ĉe la fenestro. Tiu homo rigardas suben, kie du piedirantoj paŝas sur la vojo inter la du domoj. Verŝajne estas juna paro. Sed nenio speciala videblas. La du simple iras unu apud la alia. Ili eĉ ne tenas la manojn.

La homo kun la binoklo faras sian malestiman komenton pri la najbaro. Li verŝajne taksas lin troan rigardulon. Sed kion li ĵus mem faras?

Estas klare kial oni devas minimume rideti. Sed certe ni mem iam ankaŭ sintenis sammaniere.



„Perverse, la ulo tie algapas la piedirantojn jam denove!“

## Norda starado

Jam denove nova speco da sporto?

Ni ĵus lernis ke en Germanio pli ol du milionoj da homoj praktikas la „Nordan marŝadon“ (Nordic walking). Tio estas laŭdire bona trejnado por la tuta korpo.

Sed tio ĉiam aspektas iomete komika, kiam la homoj en grupoj kun bastonoj marŝas unu apud la alia. Krome ili tiel baras la vojon de kontraŭvenantoj. Kelkaj ŝajne ne uzas la bastonojn laŭorde. Ili trenas ilin malantaŭ si. Tiamaniere ne estas pozitiva efiko por la artikoj.

Kaj kio estas malbona kun la sporto „Starante pagaji sur surfobreto“? En la germana lingvo tiu moderna sporto estas nomata "Stand-Up-Paddling", do per anglaj vortoj, eĉ se tio ne estas ĝusta. La ĝusta nomo en la angla estas "Standup paddleboarding".

Tiu tipo de movado ankoraŭ troviĝas en fora Polinezio, kie la fiŝistoj el Tahitio pagajis starante en siaj kanuoj. Kial, Kial? Kiu scias?

En Havajo instruistoj por surfado jam delonge konas tiun pagajomanieron. Ili dum tio staras ĉar tiel ili

kompreneble povas pli bone superrigardi iliajn surfadlernantojn.

La origina verŝajne polonezia vorto por tiu speco da sporto ĝis nun bedaŭrinde ne estas trovita.

Sed la plej sensacia nova sporto en Germanio estas „Hobby Horsing“ (Rajdi sur bastonĉevaleto). Denove la Germanoj uzas anglan esprimon por tiu sporto. Verŝajne estus tro ridinde uzi la germanan nomon.

Televidelsendaĵo en lasta monato prezentis tiun specon de amuza sporto. Por tio pleje kunvenas etaj knabinoj en la klubejo. Ili poziciigas la hobiĉevalon inter siaj gamboj. Tiam il kuras kaj saltetas kiel ĉevaloj super obstaklojn. Antaŭe ili kompreneble amike karesis la kapojn de siaj ĉevaletoj, kiujn multofte produktis iliaj patrinoj.

Sed ankoraŭ nepre menciendas ke intertempe en Finnlando okazas veraj ĉampionejoj por Hobby Horsing. Mi nur demandas kiam kurado kun ovo sur kulero fariĝos olimpika disciplino?

Tiam la nomo en Germanio verŝajne nur estus "**Egg Running With A Spoon**". Sed tio estas tro longa nomo. Ni bezonas plaĉan mallongigon. Ĉu **ERWAS** taŭgus? Tio estus vere mirinda, ĉu ne?

La sekvanta bildo nun prezentas tute alian specon da sporto.



„Ĉu vi praktikas Nordan Marŝadon?“ - „Ne, tio estas malbona por la artikoj. Mi praktikas Nordan Staradon.“

## Ŝnursaltado

Multaj homoj evidente volas eskapi la enuon per danĝeraj sportaj aktivecoj. Tiuj ekstremaj sportoj estas ekz. Mountainbiking (Montobiciklado), Dirtbiking (Biciklado tra malpuraĵoj), Freeclimbing (Libera grimrado), Canyoning (Kanjonado), Highlining (Ŝnurpaŝado en alteco) kaj Big-Wave-Surfing (Surfado sur ondegoj).

Se vi estas normala ne-sportisto, vi nur povas skui la kapon pri tia aventurema spirito. Verŝajne dum tio oni ricevas la ĝustan instigon kaj enuo estas anstataŭigita per ekscito. Tio memorigas nin pri la tielnomata „Ondo-Fervoja Avinjo“ el la jaro 2016. Laŭraporte ŝi (76 jaraĝa) veturis jam pli ol milfoje per la amuza ondo-fervojo. Post tio ŝiaj kutimaj konstantaj dorsodoloroj tute malaperis.

Kiel tio eblas? Pensu pri infano unu- ĝis dujaraĝa, kiun avĉjo provas gajigi. Li kuŝas sur la tapiŝo kaj tenas la etulon per ambaŭ manoj supren en la aero. Tiam li subite movas siajn brakojn rapide malsupren. La infano verŝajne sentas ke ĝi falas kaj ektimas. Sed tuj poste ĝi ekridas ĉar ĝi ja rimarkas ke ne estas danĝero. Tiu proceduro povas esti plurfoje ripetata ĝis la amuzan ludon interrompas avinjo.

Jes, se tio donas ĝojon, tiam certe ankaŭ estas pozitiva influo por la sano. Sed tio kompreneble estas tute malsama en la specifa tipo de ŝnursaltado, kiun prezentas la sekvanta bildo:



„Momenton, ĉu la ŝnuro ne devas esti fiksata je la gamboj?“ - „Kredu min, tiamaniere iĝos mortcerta unika sperto.“



## Aviadila kraŝo

Ĉiu, kiu kelkfoje vojaĝis per aviadilo, certe scias tion. Dum longa flugo la maŝino pasas tra tielnomata aertruo. Tiam ĝi ekskuiĝas kaj komencas sinki. La stevardinoj petas la pasaĝerojn resti trankvilaj. Sed tio ne estas tiel facile. La plejmulto de ili eksentas fortan timon. Nur kiam la flugkapitano sukcesis elfuĝi la turbulecojn, ĉiu povas denove spiri trankvile. Plejofte ĉiuj dankas lin per laŭta aplaŭdo.

Kompreneble ne ekzistas aeraj truoj. La kaŭzo estas nur la diversaj aerfluoj, kiuj regas tie supre. Kaj pro tio la maŝino sinkas kelkajn metrojn malsupren. Sed tio ne estas danĝera. Tiam estas tre bone se ĉiu estas sekurita per zono. Ĉar povas ja okazi, ke oni estas ĵetita tra la maŝino.

Sciencistoj el Anglio analizante flugajn datumojn, eltrovis, ke dum la lastaj jaroj estis pliiĝo de tiaj turbulecoj. La kaŭzoj venas verŝajne de la klimata ŝanĝo, kiu laŭdire influas la jetfluron. Sed kiu respondecas por la klimata ŝanĝo?

Ni homoj verŝajne tute ne plu rajtas flugi, ne plu vojaĝi per aŭto aŭ amuziĝi sur krosŝipo. Ni ankaŭ devas ŝanĝi nian nutraĵon kaj eviti iu ajn plaston se ni

ne sukcesas teni ĉion neŭtrala por la klimato kaj nur vivi daŭripovece.

Al tio pensis verŝajne ankaŭ nia desegnistoj:



„La malbona novaĵo: Ni kraŝas. La bona: Ĉiuj partoj de ĉi tiu flugmaŝino estas faritaj el reciklebla kruda materialo kaj sekve apenaŭ ŝarĝas la medion.“

## Tatuoj

La nombro de homoj, kiuj lasas sin tatui, kreskas. Evidente estas modo. Por maorioj la „arto sur la korpo“ estas parto de la kulturo. Sed kion kelkaj homoj ĉe ni nun portas sur la haŭto, ofte tute ne estas arto.

Jam antaŭ longa tempo maristoj skribigis la nomojn de siaj amatinoj sur siajn korpojn. Pro la ŝipvojaĝoj en foraj landoj ili estis ja longe disaj de ili. Tio hodiaŭ ne plu estas tiel. Kaj, kio okazas post divorco? Tiam la eterna promeso de amo ĉiam ankoraŭ restas. La malaperigo de tatuoj povas esti tre doloriga.

Sed pri tio multaj homoj ne pensas. Laŭdire ekzistas eĉ kelkaj kiuj fieras pri la intertempe pli ol kvin nomoj de iliaj iamaj partneroj sur la haŭto.

Aliaj ŝajne havas tute aliajn motivojn. Kio instigis viron, kiu lasis sin tatui per la pruvo de la vakcinado kiel QR-kodo? Post kelka tempo tio ja ne plu estas valida!

Eĉ pli strange estas, se iu lasis skribi la plenan fakturon de McDonald sur sian brakon. Almenaŭ tio estas certe sen eraro. Aliaj portas tatuojn kun ortografiaj eraroj. Se oni elektas ĉinan simbolon kiel

tatuon, estus tre bone scii la signifon de ĝi. Sed ĉi tie preskaŭ neniu rimarkus. La ĉefa celo estas la bela aspekto! Tial ĝi eĉ povas esti poziciita tute malĝuste.


Estas klare, ke ĉiu havas la rajton, ornami sian korpon, kiel li volas. Dum tio la tatuita homo konscie akceptas ke ekzistas aliaj kiuj ne ŝatas tiajn ornamaĵojn. Certaj tatuoj eĉ estas malpermesitaj, ekzemple neniu rajtas porti la nazian svastikon aŭ signojn de la armita SS. Ankaŭ portretoj de Adolf Hitler estas tabuaj.

Policistoj ne rajtas havi tatuojn, kiuj ĉiutage montreblus, do sur brako, mano, kolo aŭ sur la vizaĝo. Sed tiu regulo verŝajne baldaŭ malstreĉiĝos ĉar intertempe estas tiel multe da homoj kun tatuoj kaj la polico ĉiam bezonas plian personaron.

Do, ne miru se dum via venonta aresto vi estas kaptita per polica oficiro kun bildo de kranio sur antaŭbrako!

La desegnisto konas ankaŭ la enspezigan uzadon por tatuoj: Reklamaj tatuoj!

Tio vere ekzistas! Laŭraporte juna viro laŭvorte vendas sian haŭton. Li ofertas al kompanioj meti la firmaan emblemon sur sian haŭton. Komprenoble li postulas kelkmil Eŭrojn se la tatuoj situtas sur la dorso. Por la kolo la kostoj estus eĉ kvincifera prezo.



„ĈI TIE POVUS ESTI VIA REKLAMO“  
„Kaj, kion vi pensas pri mia nova tatuoj?“

## Motorciklado

Tio tute ne estas amuza, kio tie estas prezentita en la bildo.

Sur motorciklo sidas juna viro kun helblonda hararo, sen kasko. Li portas oranĝkoloran puloveron kaj brile bluan pantalonon. Malantaŭ li sidas iu. Li eble sidas sur la skotero nerimarkite kaj kovras dum stirado la okulojn de la ŝoforo per unu mano. Tiam li demandas ĉu la ŝoforo povus diveni, kiu li estas.

Sed tiu ne scias tion. Mirigite li pensas ke povas esti unu de siaj du amikinoj, kiuj eble volas fari ŝercon. Tial li demande vokas ilies nomojn.

La kunvojaĝanto portas grizan jakon kun kapuĉo kaj nigran pantalonon. Lia vizaĝo similas al kranio. Lia mano estas tiu de skeleto. Inter ŝoforo kaj kunvojaĝanto staras granda falĉilo.

Ne, ne. Tiu ne estas amuza bildo. Estas nigra humuro. La desegnisto volas kaŭzi malkomforton kaj provoki sinceran pripensadon.

Tio estas ankaŭ „opinio“ de ChatGPT. Al tiu AI estis sendita la informo pri la supre priskribita situacio.

La artefarita intelekto skribas:

"La humura aspekto de ĉi tiu bildo verŝajne estas ke la situacio estas tiel absurda kaj malhela ke ĝi ŝajnas komika en sia absurdaĵo.

Nigra humuro ofte uzas polemikajn aŭ malkonvenajn temojn por ekigi humurajn reagojn. En ĉi tiu kazo, la desegnisto eble provos emfazi la absurdecon kaj sencecon de la situacio, kiu eble kaŭzos la spektanton rideti aŭ ridi malgraŭ la malhela temo.

Tamen, nigra humuro estas subjektiva kaj povas esti perceptita alimaniere de persono al persono. Kelkaj povas trovi la bildon amuza, dum aliaj povas trovi ĝin malagraba aŭ ĝena."

Demandite ĉu la bildo eble ankaŭ povus enhavi averton pri la danĝeroj de motorciklado, ChatGPT respondis jese kaj skribis:

"Jes, estas tute eble, ke la desegnisto volas uzi ĉi tiun bildon por montri la danĝerojn de motorciklado. La sceno en kiu la motorciklanto vojaĝas sen kasko kaj en okulfrapaj vestaĵoj kaj estas distrita de timiga pasaĝero povus esti simbola por la riskoj kaj distraĵoj kiuj alfrontas motorciklantojn sur la vojo."



„Divenu, kiu kunvojaĝas!“ - „Uschi? Petra?“



## En la zoo

Ankaŭ bestoj en la zoo havas sian propran volon. Zoogardisto plendas pri la ekstraordinare impertinenta ĝirafo. Je la fino de la labortago ĉiu gardidisto ĝojas hejmeniri. Tial ili devas gvidi la grandan beston al ĝia kavo. Ŝajne libervole ĝi ekiras, sed subite ĝi komencas urini. Kaj tio daŭras dudek minutojn.

En Londona zoo simioj specialiĝis al la ŝtelado de sunokulvitroj de la vizitantoj. Nun la zoogardistoj provas deĉimigi tiun malbonan moron de ili.

Eĉ smartfonoj ne estas sekuraj. En zooparko en Filipinoj estis simio, kiu verŝajne multe ĝenis pri la vizitantoj, kiuj daŭre filmis ĝin. Tute senatendite ĝi kaptis la smartfonon de iu virino kaj turnis la tablojn. La fotoj de la timigita vizitantino konkeris la reton.

Ankaŭ ĉe la goriloj oni devas esti singardema. Neniam tamburu per viaj pugnoj sur vian bruston! Tiam povas esti ke la gorilo iĝas iomete agresiva kaj ĵetas elŝiritajn herbotufojn al la vizitanto.

Unu el la vizitantinoj de la elefanto-orfejo en Srilanko spertas ke oni ŝtelis sian mansakon. La ŝtelisto estas eta elefanto kiu unue tre afable alproksimiĝas la virinon kaj eĉ karesas ŝin per sia trunko al ŝia mano.

Tamen, en la poŝo estas bongustaj mango-fruktoj kaj tial la besto tute ne povas rezisti ilin. Jes, elefantoj ĝojas pleje pri la bongustaĵoj de iliaj gastoj kaj tial avide etendas siajn trunkojn super la muron.

Tio povas esti tre danĝera, kiel montras la sekvanta bildo:



„Mi eĉ diris: Se la infanoj donas ion al vi, ne tro forte enspiru!“ - „Panjoo!“

## Telefonado

Antaŭ pli ol dudek jaroj unu virino regule marŝadis kun grandaj paŝoj tra la piedira zono de nia malgranda urbo. Ŝi ne rigardis dekstren aŭ maldekstren. Dum tio ni ĉiam aŭdis ŝin laŭte paroli. Ĉiu supozis, eĉ se la virino ne estis persone konata, ke ŝi devis suferi pro gravaj psikaj problemoj. Kial neniu povis helpi ŝin?

Kiam hodiaŭ ni promenas tra la stratoj, tia konduto montriĝas konstante kvankam la respektivaj homoj estas tute normalaj. Ili telefonas libermane. La aŭdilo estas nevidebla kaj neniu scias kie kaŝas sin la mikrofono. Sed ie je la korpo ili portas sian smartfonon, per kiu ili povas komuniki. Aliaj preterpasas vin en klinita pozo. Ofte oni devas flankenpaŝi antaŭ ili, ĉar ili ja ne rigardas antaŭen. Ili tenas la smartfonon en unu mano antaŭ la buŝo kaj parolas en ĝin. Eĉ se ili puŝas infanĉaron, la parolado ne ĉesas. Tiam evidente ne estas ĝeno, se la etulo baraktas kun siaj brakoj kaj krias.

Pasaĝeroj eniras la buson sen saluti la ŝoforon, ĉar ili ja plene profundiĝas en grava konversacio, kiun ĉiuj aliaj pasaĝeroj kompreneble povas kunaŭskulti.

Pli aĉas nature, kiam ŝoforoj dumstire okupiĝas pri sia smartfono. Sed ankaŭ biciklantoj povas fari tion. Eĉ E-skotero-rajdantoj uzas siajn smartfonojn dum veturado.

En kia tempo ni efektive vivas?

Ĉu iu rememoras la tempon kiam ne ĉiu havis propran telefonaparaton? Tiam oni simple vizitis pli modernan najbaron petante lin uzi lian telefonon. Ankaŭ estis kutimo sidi ĉe li en la koridoro kaj atendi la telefon Alvokon de iu parenco. Al tiu oni antaŭe donis la telefononumeron de la ĝentila najbaro.

Ho, jes. Ekzistis tiuj flavaj telefonkabinoj. Oni staris en la vico. Kaj, kiam oni rajtis eniri, tiam ekis la problemoj. Tre grave ja estis, ke oni kunportis la ĝustajn monerojn en ĝusta kvanto.

Hejme, kiam la telefono konkeris la bonan loĝĉambron, ĉiu ĝojis. Speciale kiam la edzino dum horoj telefonis kun sia amikino.

Tiaj spertoj evidente inspiris nian desegniston por fari tiun bildon:



„Karulino, *êu vi devas daüre telefoni?!*“ - „*Alvoku min per telefono, se vi volas ion de mi!*“

## Ĉe la dentisto

Antaŭ nelonge ni renkontis Peter P. Li ĵus venis de vizito ĉe dentisto. Ni provis konsoli lin:

"Ni kompatas vin! Tio certe donis grandajn dolorojn!"  
Sed lia respondo surprizis nin:

"Tio tute ne estis tiel malbone. Mi ricevis injekton kaj poste ĉio estis tiel bela. Kiel en la ferioj. Suno, plaĝo, maro."

Certe aliaj pacientoj havas aliajn spertojn, ĉu ne?

Ĉu vi konas la filmon 'Cast Away - Malaperinta'? Temas pri iu Chuck Noland kiu albordiĝis sur dezerta insulo. Li suferis de aĉaj dentodoloroj kaj provis frapi sian doloran denton el sia makzelo per glaci-sketklingo. Sed li havis ja ununuran amikon, la pilkon "Wilson". Sur tiun li pentris vizaĝon per sango.

Pli gaja estas la filmo, en kiu Mr. Bean vizitas la dentiston. Tiu mallerta paciento sukcesis turni la injektilon tiel, ke ĝi trafas la kuraciston kiu sekve estis anestezita. Poste Mr. Bean mem riparas siajn dentojn.

Jes, por esti honesta, kutime ne estas tiel amuze ĉe la dentisto. Tial oni ĝojos se la vizitoj en la estonteco

estus pli malstreĉitaj. Siencistoj inventis aŭdilon, kiu povas kaŝi la penetran sonon de la borilo kun kontraŭbruo.

Sed tion tiu paciento ne bezonas:



„Mia unua tasko kiel dentisto...” - „Lia lasta tasko kiel dentisto ...“

## Malica ĝojo

Tio servas al li ĝuste, oni pensas kaj ridas kaŝe. Temas pri iu, kiu arogante fanfaronas kaj ĉie proklamas kion li volas fari. Kaj poste ne estas rezulto. Tial oni komprenas la ĝojon pri la malbono, pri kiu li nun lamentas.

Sed ofte ne estas signo de amikeco, se oni sentas malican ĝojon. Oni ja malenvias lian malfeliĉon. Tiam estas kompreneble ĝui la ĝojon sekrete.


La tabloludo "Mensch ärgere dich nicht" (Homo ne ĉagreniĝu!) permesas malican ĝojon. Vi rajtas laŭte ridi, kiam kunludanto antaŭ la celo perdas sian ludfiguron. Tiun vi ĵus senindulge elĵetis. Kaj nun altiĝas la ŝancoj ke vi ankoraŭ mem venkas!

Cetere, ĉu vi sciis, ke la germana vorto por malica ĝojo "Schadenfreude" ankaŭ estas uzata en la angla lingvo? En la jaro 1991 Homer Simpson en karikaturna bildstrio ĝuste klarigis "Schadenfreude" por la usonanoj. Post tio la uzado de tiu esprimo en skribita formo eminente kreskis.

Ĉiuj, kiuj ofte plendas pro kreskanta uzado de anglaj vortoj en la germana lingvo, havas nun kompreneblan kaŭzon por senti malican ĝojon, ĉu ne?



La muŝo en tiu bildo verŝajne tute ne zorgas pri iuj lingvaj problemoj.



## Akvario

Hundo povas kopii sian posedanton. Laŭraporte viro, kiu havis malsanan kruron, lame promenis kun sia hundo. Tiu besto nun ankaŭ lamiris kiel li.

Sed ĉu tiu poemo priskribas realan situacion?


Instruisto post labor’  
fumas pipon kun plezur’,  
kaj en akvario  
mankas kanario.

En ĝi fiŝo kun memor’,  
estas tre bona aktor’.  
Lerta besto el la mar’  
naĝas gaje sen cigar’.

Fiŝo kaj la viro  
estas granda miro.  
Sed por la ezin’  
mankas la fascin’.

Edzo, mi ja perdos vin!  
Nur por fiŝ’ restas inklin’  
Ĝi la pipon eĉ imitas.  
Ĉesu baldaŭ, mi instigas!

La karikaturisto evidente spertis tian travivaĵon.  
Alikaze li ja ne povus desegni tiel ekzakte.



„Ĉu vi ne pensas, ke vi pasigas iom tro da tempo kun  
via fiŝo?“

## **Notoj de la desegnisto**

Kartunoj estas ŝercoj el unu bildo. Se estas minimume du bildoj, oni nomas tion bildstrio (komikso).

Bildstrioj estas tre popularaj, verŝajne ĉar ili prezentas situaciojn tre rapidspirite. La arto kuŝas en la prezentado de rakonto kun nur unu bildo kaj fini kun surpriza efiko. Sed ankaŭ kartunistoj kelkfoje faras mallongajn bildstriojn. Tiuj havas sian propran ĉarmon. Sinsekva kunmeto de la bildoj kreas filmon en la menso de la leganto ĉar la cerbo kunligas la ‚momentfotajn‘ al tuta evento.

Krome la desegnisto povas profiti de tio, ke li unue kaŝas certan aspekton de la okazaĵoj kaj malkaŝas ĝin nur dum la kulmino en la lasta bildo kiel surprizon.

Laŭ mi la supera arto en la kampo de desegnitaj ŝercoj estas la kartuno, sekvata de la bildstrio. Tio povas esti mallonga sekvo el bildoj kiel ekzemple tiuj de ‚Peanuts‘ aŭ ‚Garfield‘, kaj de bildstrio sur nur unu paĝo (One-Pager en la angla).

‚Kiel vi efektive faras tion?‘, estas kelkfoje demandite. Por tio mi nur povas paroli pri mi mem.

Ĉiukaze ne estas tiel, ke mi sidiĝas kaj simple skribaĉas ion sur la paperon. Tio okazas nur tre malofte. Dum la komenca ide-serĉado malaperas 80-90% de la skizoj en la rubujo.

Parto de la ideoj venas kiam mi faras konfuzajn skizojn, sed la plejmulto ekestas rilate al la prezentado de dialogoj. Du homoj, du parolvezikoj, tio estas la fundamento de multaj el miaj kartunoj.

Ankaŭ eblas trovi la ideon dum la evoluo de la figuroj, simile al kreiva skribado. Dum tio estas helpeme pripensi kion la figuro speciale intencas.

Oni povas ankaŭ komenci kun la situacio – ekzemple la aviadila kraŝo, flamoj en loĝejo aŭ la vizito en la zoo - ĉiaj eblaj situacioj, foje kun fokuso sur ago, danĝeraj, aŭ tute normalaj.

Do, oni havas bazan ideon. Poste oni bezonas realigi ĝin per desegno. Ankaŭ grava estas la komponaĵo de la bildo kaj la tuta aranĝado. Kie mi metu la parolvezikojn? Kien direktiĝas la fotilo?

En nia okcidenta kulturo ni rigardas kartunon de supre-maldekstre ĝis malsupre-dekstre. Se mi ekzemple volas dezajni du protagonistojn kun du parolvezikoj tiel estas la plano: La unua parolvezikon

mi metas supren-maldekstren, la duan plej bone ĵus apuden. Se oni uzas pliajn parolvezikojn, tiam la sekva de la maldekstra protagonisto estus metita sub la unuan vezikon, kaj sur saman altecon la sekva de la alia figuro.

## **Ideoriĉeco, kreiveco kaj amuzo**

Unuflanke, mi pensis, ke helpas havi fiksan taskon kun kadro por la temo kaj limdaton. En longa tempo, tamen, mi trovas ĝin ege malfacile esti kreema per premo de butono. Tiu, kiu rigardis mian retan paĝon [\*vidu malsupre], eble rimarkis, ke la plej multaj partoj estas de la jaroj 2011 ĝis 2013. Verdire ekde tiam mi ne plu inventis novajn kartunojn, sed mi direktiĝis al aliaj artoj kiel muziko kaj magia lertaĵo.

Ju pli kaj pli profesie mi laboris pri la bildoj, des pli mi bedaŭrinde perdis la amuzon pri ili. Krom tio, kiel komencanto, mi spertis problemojn ĝuste atentigi aliajn pri miaj bildoj. Fine mi rezignis kaj okupiĝas pri aliaj aferoj, kiuj donas al mi pli da amuzo. Ĉar, se mi kiel desegnisto ne havas amuzon por fari la bildojn, kiel mi ridigu miajn legantojn kaj ŝatantojn?

[\*] \_\_\_\_\_  
[www.voll-im-eimer.blogspot.com](http://www.voll-im-eimer.blogspot.com)

Kien nun montras la vojo? Estis tre granda helpo kiam mi povis regule transferi miajn unuajn paŝojn al la reto, speciale ĉe toonsup.com. Per kritiko kaj eraroj (+korektoj) oni plej bone lernas. Sed mi ne volas kaŝi, ke mi rezignis pri miaj kartunaj kaj bildstriaĵaj projektoj kiel ankaŭ pri „D-ro Frenezulo“, la freneza kuracisto, kiu ne tre serioze celas al siaj paciencoj. Estis nur kelkaj bildstrioj en la serio.

Sed kiu scias, kion alportas la estonteco?

Povas ja esti ke iam estas reveno de KAYSN Kartunoj. ...

## **Postparolo**

Estas klare al ni, ke ĉiu ŝerco en certa situacio ne povas esti perceptata kiel amuza. Dependas ja ĉiam de la kondiĉoj kiu regas momente.

Neniukaze ni havas kaj havis la intencon ofendi iun. Se tamen iu sentas sin ofendita, ni sincere petas pardonon.

Grandan dankon al Robert kiuj helpis korekti kaj pilbonigi la tekstojn.

Kay & Klaus Friese

Hamburgo, 2023



# Kolofono

<b>Titolo</b>	Ridu por via sano
<b>Originala titolo</b>	Lachen ist gesund
<b>Versio 1.1</b>	1-a Eldono, 2023
<b>Aŭtoro</b>	Kay (Kaysn) & Klaus Frieze
<b>Traduko</b>	Klaus Frieze
<b>Aŭtoraj rajtoj</b>	© Klaus Frieze, Hamburgo
<b>Retpoŝto</b>	frieze@esperanto-hamburg.de
<b>Desegnoj</b>	Kay Frieze
<b>Hejmpaĝo</b>	esperanto-klaus.de

